

Heinrich Heine,
 Pinarbo staras sola
tradukita de Friedrich Pillath

Pinarbo staras sola
 En nordo sur nuda altaĝ'.
 Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
 Ĝin kovras blanka litaĝ'.

Songadas ĝi pri palmo
 Ĝemanta en orient',
 Soleca, sur arda deklivo
 En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Fichtenbaum steht einsam” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04-03).*

Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.uwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.

Heinrich Heine,
 En nord' unu pino en solo
tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Iomete ŝanĝita versio

En nord' unu pino en solo
 Dormetas sur nuda altaĝ';
 Glacio kaj neĝa tavolo
 Ĝin kovras per tomba tolaj'.

Ĝi songas, ke palmo gracia
 Ĝi estas en orient',
 Eterne pri lando alia
 Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Fichtenbaum steht einsam” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)

Mi, Manfred Retzlaff, aliigis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.